Gazeto Andaluzia

Andaluzio per si, por Hispanio kaj la Homaro

31-a Jarkolekto * Septembro 2017 * N-ro 106

ISSN 1576-0618



TEBA

tie la brava koro fariĝis legendo

Gazeto Andaluzia
Fundada por D. José Garzón Ruíz, en San Fernando (Cádiz) en 1910.
Órgano oficial de la **Asociación Andaluza de Esperanto.**

EDITA: Asociación Andaluza de Esperanto
REDACCIÓN: C/ Anfora 6 5-D 29013 Málaga (Hispanio)
DEPÓSITO LEGAL: MA-1136/86. ISSN: 1576-0618.
IMPRIME: Litopress SL Córdoba

DIRECTOR: Ángel ARQUILLOS LÓPEZ
REDACTOR: José María RODRÍGUEZ HERNÁNDEZ
(esperanto14@ono.com)

ENHAVO

Esperanto en Andaluzio 3
Información de Interés – Curso en la UNED 7
Trilanda Kongreso en la plej sudorienta Azio 8
Andaluzoj en Havajo 13
Lingva Angulo 18
Turismi en *Teba* 22
Flamenko 28
Misteroj kaj legendoj de Andaluzio 30
Vorta Piramido 32
Humuro 34

Noto: pri la enhavo de la artikoloj respondecas la aŭtoroj mem.
La redaktoro rajtas rifuzi nepetitajn artikolojn.

ESPERANTO EN ANDALUZIO

Re-inaŭguro de *Avenuo Esperanto* en Torokso 2017

La pasintan 16-an de decembro 2017 okazis en Torokso (Malago) la re-inaŭguro de la "Avenuo Esperanto". Ĉi tiu publika loko estas konsiderata kiel la plej longa strato kun zamenhofa aŭ esperanto-nomo en la mondo, laŭdire ĝi mezuras 1,5 kilometrojn. La unua inaŭguro de la avenuo okazis en la monato aŭgusto 1987, kadre de la tiu-jara andaluzia kongreso de Esperanto, organizita por jubilei la unuan jarcenton de nia lingvo.



Partoprenantoj en la re-inaŭguro de la
Avenuo Esperanto en Torokso (Malago)

En tiu jaro, 1987, nia kar-memora samideano Antonio González Álvarez strebis cele la nomigon de strato en sia vilaĝo kun la nomo "Esperanto". Li persvadis la tiutempan toroksan urbodomon, kiu fine akceptis nomigi straton en Torokso kun la nomo "Esperanto". Ĉeestis tiun unuan inaŭguron preskaŭ sesdeko da gepartoprenantoj en tiu memorata 5-a Andaluzia Kongreso de Esperanto.




Unua oficiala inaŭguro de la *Avenuo Esperanto* en Torokso. Aŭgusto 1987.

Tamen, dum ĉi tiuj lastaj 30 jaroj, la kvartalo ja kreskis kaj tiu loko, nuntempe, estas unu el la ĉefaj aksoj de la marborda kvartalo de Torokso. La nomo de la avenuo nur aperis sur land-kartoj, ĉar novaj konstruaĵoj malaperigis la originalan montro-ŝildon.

Do, Andaluzia Esperanto-Unuiĝo kontaktis denove kun la Toroksa Urbodomo por peti la re-inaŭguron de la *Avenuo Esperanto,* okaze de la 30-a datreveno de la nomigo. Ni ankaŭ celis memori kaj omaĝi nian karan Antonio González Álvarez, kiu forpasis antaŭ kelkaj jaroj.

Tiel, la pasintan 16-an de decembro de la pasinta jaro renkontiĝis denove en Torokso grupo de gesamideanoj de Malago, Kordovo kaj Sevilo. Ĉeestis la re-inaŭguron, apud la esperantistaro, la urbestro de Torokso, kiu profitis la okazon por proponi sian urbon por la okazigo de venonta andaluzia kongreso de esperanto. Kompreneble la estraro de la asocio bonvenigis ĉi tiun sindoneman oferton kaj tiel,

jam estas planite, oni organizos en venontaj jaroj andaluzian kongreson de nia lingvo en tiu sun-marborda urbo.



La Urbestro de Torokso kaj membroj de Andaluzia Esperanto-Unuiĝo okaze de la re-inaŭguro de la Avenuo

Post la re-inaŭguro, kaj invititaj de la Domo de la Emerituloj, ni okazigis en la sidejo de tiu asocio prelegon pri la rilatoj inter Esperanto kaj Torokso antaŭ 30 jaroj.

Ni invitis ankaŭ la familianojn de Antonio González Álvarez kaj apud ili, ni havis la eblecon montri dekojn da antikvaj fotografaĵoj de Torokso. La familianoj de AGA (ĉi tiel estis konata Antonio en la esperantista movado), dankis lian memorigon kaj ili esprimis la gravecon de Esperanto por li.

Post la prezento de la antikvaj fotografaĵoj de Torokso, nia samideano José María Rodríguez, de Kordovo, prelegis pri la temo "Blas Infante kaj Esperanto". Okaze de tiu prelego la aŭtoro prezentis novan teorion pri kiamaniere la patro de la andaluzia patrujo lernis la internacian lingvon dum la 2-a jardeko de la pasinta jarcento.

La aktoj celantaj memorigi al Antonio González kaj la reinaŭguri la Avenuon Esperanto en Torokso finiĝis ĉe apuda restoracio. Tie la ĉeestanta esperantistaro, kelkaj membroj de la klubo de emerituloj de Torokso kaj novaj esperantistoj ĵus venintaj de Vélez-Málaga, kun Fabián Jiménez, profitis la okazon por bierumi kaj manĝi bonetose. Kompreneble, oni profitis la momenton por disvastigi la ekziston de la internacia lingvo.

Espereble, post ne-multaj jaroj, nova andaluzia kongreso de Esperanto okazos en la urbo Torokso, tie nia asocio jam okazigis nombrajn renkontiĝojn kaj kongresojn dum la 8-a kaj 9-a jardeko de la pasinta jarcento.



Partoprenantoj en la Zamenhofa Festo de Torokso - 2017

INFORMACIÓN DE INTERÉS
para todos los que estén interesados en aprender Esperanto o hayan iniciado su aprendizaje

El CUID (Centro Univeristario de Idiomas a Distancia) de la UNED (Universidad Nacional de Educación a Distancia) va a incluir en el próximo curso escolar 2018-2019 la enseñanza oficial del idioma internacional Esperanto.

La enseñanza se llevará a cabo a distancia, así no será necesario acudir a clase alguna, finalizando el curso con una prueba escrita y oral, a realizar en los centros asociados existentes en todas las provincias. Se puede obtener un certificado de suficiencia que otorga un nivel A2 de conocimiento del idioma Esperanto.

El período de matrícula comienza el 3 de septiembre y finaliza el 8 de noviembre de 2018. Más información sobre el curso (contenidos, matrícula, etc) se puede obtener en:

https://www.cuid.uned.es/

Y también a través del coordinador del curso:

Manuel Pancorbo Castro
91 398 71 87
mpancorbo@ccia.uned.es

UNED
CUID
Centro Universitario de Idiomas a Distancia


Trilanda Kongreso en la plej Sudorienta Azio. Esperplena kaj ĝuinda

Carlos Spinola. Malago

Ĉi jare mi havis la okazon partopreni en la Dua Trilanda Kongreso de Esperanto (Indonezio, Aŭstralio kaj NovZelando), kiu okazis en la urbo Bekasi, apud Ĝakarto (Indonezio), de la 28-a de marto ĝis la 2-a de aprilo.

Erlanga Femayuga, kiu akceptis nin en la flughaveno, tuj klarigis ke Indonezio estas la kvara plej loĝata lando en la mondo, kiu etendiĝas tra tri horzonoj. Ĝi ujas pli ol 300 etnoj kun propraj lingvoj kaj kulturoj, en pli ol 6000 insuloj.

Elektiĝis Bekasi, komentas Ilia Sumilfia Dewi, prezidanto de la Indonezia Esperanto-Asocio, ĉar tie troviĝas junuloj, kiuj jam bone regas E-on, kaj aliaj, kiuj antaŭ ne longe eklernis ĝin, kaj ili ĉiuj pretis kunlabori en la organizado. Fakte tiu juna etoso estis unu el la plej agrablaj surprizoj dum la tuta agado.



Per-boateta translokiĝo nia kune kun niaj bagaĝoj al alia ŝipo, kiu vojaĝigos nin al nacia parko.

Partoprenis 37 indonezianoj kaj 29 alilandanoj, el Aŭstralio, Nov-Zelando, Belgio, Hispanio, Koreio, Filipino kaj Orienta Timoro. Tiu lasta grupo danke al Heidi Goes, forte engaĝita en la evoluo de Esperanto en tiu regiono, ĉefe en Orienta Timoro kaj Indonezio. Ŝi atingis la financajn rimedojn por realigi tiun partoprenon.



Grupa foto en korto de la kongresejo.

Antaŭa kaj posta allogaj ekskursoj estis organizitaj por kompletigi la programon de tiu agado. Mi estis inter la naŭ homoj, kiuj partoprenis en la antaŭa. Ni trairis la okcidentan marbordon de la Java insulo inkluzive de boata vizito al la impresa vulkano Krakatau, kaj al la nacia parko Ujung Kulon. Ne temis pri tipa turisma vizito, sed tute ekzota kaj aparta, laŭ la loĝlokoj, boatoj uzitaj, kaj gvido farita de lokaj indoneziaj homoj, kune kun la esperanta gvido de la juna esperantisto Erlangga. La plano por la posta ekskurso estis tre alloga sed mi mem ne povis partopreni. Post la kongreso la partoprenantoj flugis al la Balia regiono por viziti la tieajn elstarajn vidindaĵojn.

La kongresejo kaj ĉefa loĝejo lokiĝis en la Hotelo Horizon, sufiĉe konforta kaj luksa, sed pro tio ne ĉiam ni povis kundividi la manĝejajn tempojn kun la lokanoj. Por la malfermo la orient-timoranoj

regalis nin per tipaj dancoj, vestaĵoj kaj kanzonoj. Sandor Horvatz, el Australio, pretigis bonan programon, kie abundis interesaj kaj variaj prelegoj. Elstaris tiu de Heidi Goes pri la historio de la esperanta movado en Indonezio, temo de ŝia esplora libro, kiu ne povis esti publikigita okaze de ĉi tiu kongreso, sed certe aperos dum la Lisbona UK. Humphrey Tonkin kaj Mark Fettes intervenis skajpe sur granda ekrano pri la evoluo de Esperanto en la nuna mondo. Ili eĉ estis rekte demanditaj de la partoprenantoj. Por anstataŭigi ne ĉeestantajn prelegantojn, tio povas estis sufiĉe bona sperto krom la ĝeno de la tele-partoprenantoj pro la horzona diferenco en nia sfera mondo.




Erlanga (kun okulvitroj) nia juna esperanta gvidanto, aŭstralianoj kaj ni en la deklivo de la Krakatoa vulkano.

Ne mankis prezentoj pri aliaj diversaj temoj, kiel Flagoj de la Mondo, Interplaneda spaca navigado kaj malkovroj de la Cassini esplorŝipo, Historio de Bekasi urbo, Esperanto: akademia lingvo (pri kurso en la hispana Sevilla Universitato), la Indonezia Lingvo, Kiel verki por la elektronika ekrano (skajpe), kaj multaj aliaj. Mi elstarigus la prezenton de “Esperanto-movado en Filipino”, de la junulo Albert Stalin Garrido, tre engaĝita en tiu movado, kaj bona reprezentanto de la

tiea junularo. Ne mankis esperantaj kursoj por komencantoj kaj progresintoj, arta vespero, aŭkcio, lingva festivalo, ktp.

Kompletigis la programon la ekskursa tago. Ni forveturis al Ĝakarto por viziti la Nacian Galerion, kie oni ekspozicias ĉefe modernajn artaĵojn, kaj la multege pli interesa kaj riĉenhavan Nacian Muzeon. Post la tagmanĝo ni vizitis "Taman Mini Indonesia Indah", kiu taŭgas por ĝui la belecon kaj diversecon de la indonezia arkitekturo.

Aparta sperto estis partopreni en la Senveturila Tago, kiu regule okazas en Bekasi. En urbo kie la trafiko teruras, ĉiun dimanĉon de la sesa ĝis la deka matene, mirinde oni forpelas la autojn el la granda ĉefa strato, kie dekoj da miloj da promenantoj, kurantoj, biciklantoj, kaj diversaj grupanoj, en bunta amaso festas, kaj pace piediras. Dum unu horo ni grupe marŝis, flag-svingis, kantis kaj fiere montris nian standardon. En tiu agado ankaŭ impresis la miloj da policoj kaj oficialaj kunlaborantoj, kiuj pretigas kaj prigardas tiun eventon. Indonezio rapide kaj forte evoluas, sed la infrastrukturoj, kvankam notinde kaj tre impresige kreskantaj, ankoraŭ ne plene sufiĉas. Tiu dimanĉa agado oni diris, ke ankaŭ komencas esti organizita en aliaj grandaj indoneziaj urboj.



La orienttimoranoj kun Hejdi Goes, kiu ebligis ilian partoprenon en la kongreso.

Kiam okazos la venonta Trilanda Kongreso? La diversaj organizantoj kunsidis kaj decidis esplori por starigi novan komunan eventon en Balio post du aŭ tri jaroj.

Resume tiu kongreso estas valora iniciato de tiuj tri landoj, kiuj helpas sin inter ili por kune festi kaj antaŭen puŝi esperanton. Tiel la plej forta aŭstralia movado kaj ankaŭ la novzelanda diversmaniere apogas la junan esperantan indonezian movadon, kiu bone agadas, organizas kaj esperplene kaj fiere montras ĝian junecon kaj viglecon, same kiel ilia belega, diversa, kaj bunta lando laŭ ĝia naturo, kulturo kaj historio.

Por ni eŭropanoj tiu kongreso estas bonega okazo por konatiĝi kun tiu tre interesa lando kaj malkovri kaj ĝui la amikecon de multaj diversaj homoj de la tri landoj danke al esperanto.




Grupa foto apud la Nacia Muzeo en Ĝakarto

Andaluzoj en Havajo

José María Rodríguez. Kordovo

Andaluzio estas lando el kie elmigris dum kelkaj epokoj miloj da homoj, ĉefe pro ekonomiaj kialoj. Dum la 19-a jarcento Sud-Ameriko estis la unua celo de tiuj andaluziaj elmigrantoj, tamen, la plej alta pinto en la nombro de elmigrantoj estis tiu okazita dum la 5-a kaj 6-a jardeko de la pasinta jarcento. Tiam centoj da miloj da andaluzoj foriris meze de Eŭropo, ĉefe al Germanio, Svisio, Belgio aŭ Francio, kaj al nordaj regionoj de Hispanio, kiel Katalunio kaj Baskio, kie la industrio ofertis novajn viv-rimedojn al andaluzoj.


EMIGRACION CON PASAJE GRATUITO AL ESTADO
DE HAWAI.
(ESTADOS-UNIDOS DE AMERICA)
Condiciones que deben reunir los emigrantes
DESCONFIAR DE LOS INTERMEDIARIOS
DON CARLOS CROVETTO,
CALLE DE RIOS ROSAS (antes Cañón) núm. 3.-Málaga


Afiŝo informanta pri la elmigrado en Havajon

Ne tiel konata estas la andaluzia elmigrado okazinta komence de la 20-a jarcento kies celo estis la usona insularo Havajo, je 18.000 kilometroj for de Andaluzio.

Havajo estas insularo en la Pacifika Oceano, ĝi ekzistis kiel sendependa regno ĝis la jaro 1893. En tiu jaro usonaj koloniistoj, kiuj alvenis iom-post-iom en la arkipelagon dum la 19-a jarcento, favorigis puĉon. Oni forviŝis la monarkion kaj oni proklamis respublikon, En tiuj jaroj la usona registaro sendis trupojn en Havajon por pacigi la insularon, tie okazis multaj disturboj post la malapero de la monarkia reĝimo. En la jaro 1898 Usono oficiale aneksis Havajon.

La havaja teritorio dediĉis sin ekskluzive al la kultivado de suker-kanoj kaj ananasoj. La rekolektado estis ĉiujare plenumita de aziaj enmigrantoj, ĉefe japanoj. Tiel, apud 38.000 originaj havajaj enloĝantoj kun-loĝis 154.000 enmigrantoj, el kiuj 61.000 estis japanoj. La usona registaro timis la kreskon de la japana enloĝantaro.

En la jaro 1906 la *Board Inmigration of Hawaii* (Konsilantaro por la Enmigrado en Havajon) decidis favorigi la alvenon de ne-aziaj enmigrantoj. Ili deziris la alvenon de blank-haŭtaj familioj, ĉefe de Portugalio (Madejro kaj Acoroj), de la sudo de Hispanio aŭ de Porto-Riko, ĉar la ter-kulturistoj de ĉi tiuj lokoj konis perfekte la kultivadon de la produktoj de Havajo.


MADRID. LUNES ... DE MARZO DE 1907. NÚMERO EXTRA. ... CÉNTIMOS

ABC

CRÓNICA UNIVERSAL ILUSTRADA. AÑO III. NÚM. 646 ... ÉPOCA

La tiu-epokaj ĵurnaloj informis pri la ŝipoj en la Malaga haveno kiuj vojaĝis en Havajon

Tiu konsilantaro petis al brita kompanio ekigi reklam-kampanjon por favorigi la elmigradon de tiuj eŭropanoj, ĉefe portugaloj kaj sud-hispanoj, en Havajon. Tiel, oni disvastigis en Andaluzio broŝurojn pere de kiuj la havaja arkipelago estis prezentata kiel paradizo. Malfermiĝis oficejo en Malago por rekruti kaj informi al interesitoj kaj post kelkaj monatoj 3.800 homoj jam aliĝis por elmigri en Havajon.

Ĉefe ili venis el malgrandaj vilaĝetoj, tie la malsato, la mizero kaj la analfabeteco estis tro oftaj. Al tiuj interesitoj oni promesis bonajn salajrojn, ter-pecon, propran domon, senpagan edukadon kaj post tri-jara restado en Havajo la eblecon atingi la usonan civitanecon, krome, la navigado ĝis Havajo estus sen-paga. Nur estis necese ne esti pli ol 45-jaraĝa, se viroj, kaj 40, se virinoj.

Entute ses ŝipoj eliris el Andaluzio, unu el Malago kaj la ceteraj el Ĝibraltaro. Tiel inter la jaroj 1907, dato de la unua vojaĝo, ĝis la 1913, kiam okazis la lasta, 8.000 elmigrantoj eliris el Andaluzio. El tiuj la 62% estis viroj kaj 38% virinoj. La plejmulto el ili estis maturuloj, nur la 39% el la elmigrantoj estis malpli ol 16-jaraĝaj. Rilate la originajn zonojn, la plejmulto el ili venis el Malago, Granado, Almerio kaj Jaeno.



Andaluziaj elmigrantoj en Havajo

La vojaĝo ne estis facila, 53 tagoj kaj 18.000 kilometroj. En ĉiu vojaĝo inter 20 kaj 50 homoj forpasis. Kiam la andaluzoj atingis

Havajon ĉiu familio iris en malsimilajn bienojn, tie ili okupis ĉambron kun komuna necesejo kaj kuirejo por ĉiuj familioj.

La laboro estis peza, trancado de suker-kanoj aŭ produktado de sukero en industrio. Ili devis labori dum 10 kaj 12 horoj tage, sub la kontrolo ĝenerale de portugalaj mastroj, la solaj kiuj povus kompreni kaj komprenigi sin al la hispanaj ter-kulturistoj. La salajroj tamen, ne estis tro altaj, 24 dolaroj monate. Pro la peza laboro kaj la malaltaj salajroj, multaj en la enmigrintoj foriris kiam la kontrakto subskribita finiĝis. Reveni en Hispanion estis tute maleble, pro la granda kosto de la vojaĝo kaj pro la ne-ekzisto de viv-rimedoj en la andaluzia kamparo. Do, ili foriris en Kalifornion, kies klimato kaj ter-kulturado estis tute simila al Andaluzio.

Tiel, el la unuaj 8.000 elmigrantoj, pli ol 7.000 foriris en Kalifornion por labori kiel ter-kulturistoj aŭ farmistoj en grandaj bienoj.



Andaluzia familio en Kalifornio

Tamen, en Kalifornio la ras-diskriminacio kontraŭ ĉi tiuj hispanoj estis terura. Oni malpermesis al ili eniri en publikajn lokojn

kaj eĉ por spekti filmojn ili devis okupi specialajn sid-lokojn en la kinejoj. Ĉi tiu absurda rasismo provokis eĉ ke la bankoj ne akceptis la monon ŝparitan de la hispanaj enmigrintoj, do, ili devis gardi sian monon en la propra hejmo, ŝerce la matraco kie ofte oni gardis la monon de la familio estis konata kiel la *"Banko de Hispanio"*.

Sed, ĉi tiu afero fine helpis la ekonomian situacion de la andaluzoj en Kalifornio. Tiel, kiam en la jaro 1929 la ekonomia krizo provokis la tutan ruiniĝon de la usonaj bankoj kaj do, la perdo de la mono ŝparita de la familioj, tiuj andaluzoj, kiuj gardis ĉe si monon, estis la solaj kiuj havis sufiĉe da ekonomia povo por aĉeti domojn, farmejojn kaj bienojn. Ili prosperis en tiuj kriz-tempoj.

Nuntempe, ankoraŭ ekzistas kluboj kaj asocioj kie renkontiĝas la idaro de tiuj andaluzoj, jam en tria aŭ kvara generacio, Kaj rilate tiujn kiuj restis en Havajo, la nombro de tiuj kiuj restis tie estis tre malgranda, apenaŭ mil. Ili inter-miksiĝis kun la pli grava portugala enloĝantaro de la insularo.



Amu vian landon kaj la tutan homaron: konu ĝian historion !

Lingva Angulo

Kvantaj A-vortoj



En la unuaj lecionoj sur kiu ajn esperanta libro-metodo aperas jeno:

- Adjektivoj finiĝas per A.
- Sustantivoj finiĝas per O.

Ankaŭ, kiu ajn libro asertus, ke adjektivoj akompanas la sustantivojn kaj normale, sustantivo agadas en la frazo kiel subjekto aŭ kiel (rekta) objekto. Tion oni vidas en jena frazo:

- Multaj homoj aĉetas novajn aŭtomobilojn.
  (Muchas personas compran coches nuevos)

En ĉi tiu frazo adjektivoj estas: *multaj* kaj *novajn*, dume, sustantivoj estas: *homoj* (subjekto en la frazo) kaj *aŭtomobiloj* (rekta objekto).

Tamen, A-vortoj, tio estas adjektivoj, ankaŭ povas esti uzataj, kaj tio okazas ofte, kvazaŭ ili estus O-vortoj, sustantivoj. Tiel, se ni parolas pri la preferoj de la homoj rilate aŭtomobilojn, ni povas diri:

- Multaj preferas novajn.
  (muchos los prefieren nuevos)

Oni povas diri, ke la O-vortoj (la realaj sustantivoj) estas komprenataj ĉar ili troviĝas kvazaŭ kaŝitaj sub la adjektivoj. Tiel, la reala kompreno de tiu frazo estus:

- Multaj ~~[homoj]~~ preferas novajn ~~[aŭtomobilojn]~~.

La plej oftaj adjektivoj kiuj povas esti uzataj kiel sustantivoj estas *multa, malmulta, kelka* kaj *plura.*

Tiel:

- Multaj [homoj] vizitis la ĉefajn monumentojn de la urbo.
  (Muchos visitaron los monumentos principales de la ciudad)

- Malmultaj [aŭskultantoj] venis al la koncerto.
  (Pocos han venido al concierto)

- Kelkaj [homoj] preferas somerumi en kampadejo.
  (Algunos prefieren veranear en un camping)

- Pluraj [partoprenantoj] ĉeestis la prelegon.
  (Varios asistieron a la conferencia)

Ĉu ĉiam oni povas aldoni sustantivon al ĉi tiuj adjektivoj funkciantaj kiel O-vortoj? Nu, ne ĉiam, aŭ almenaŭ ne ĉiam klarigas la frazon se oni aldonas sustantivon. Ni vidu jenan frazon:

- Vi havas dekojn da amikoj, multaj deziras viziti vian novan domon.
  (Tú tienes decenas de amigos, muchos desean visitar tu nueva casa)

Se ni anstataŭigas *"multaj"* per *"multaj amikoj"*, la senco de la frazo ne estus tre klara, ĉar ĝi reale ne signifas, ke ili estas viaj amikoj, sed ke ili estas amikoj inter si. Ni vidu:

- Vi havas dekojn da amikoj, multaj amikoj deziras viziti vian novan domon.

A-vortoj estas uzataj anstataŭ E-vortoj.

Se ni daŭrigas la unuajn lecionojn de tiu proponata esperanta libro-metodo, ni vidos ke:

- Adverboj finiĝas per E.
- Adverboj akompanas la verbojn.

Ekzemple: Kanti laŭte. Venu rapide. Studu multe.

Kompreneble, ekzistas aliaj uzoj por E-vortoj, unu el ili estas la kvanta E-vorto. Se E-vorto (tio estas: adverbo) akompanas sustantivon, ĝenerale temas pri kvanto kaj ĉiam estos necese aldoni la prepozicion "DA".

Ekzemple:

- Mi havas multe da amikoj = Mi havas multajn amikojn.

Ĉi tie "multe da" oni povus laŭ-litere traduki en la hispanan kiel *"una gran cantidad de...."*, dum "multa" estas tradukebla simple per *"muchos"*.

Ĉu oni povas egale uzi "multe da" kaj "multe" ? Ne. Kvankam la diferenco estas tre malgranda. Ni vidu: la adjektivoj: *multaj, kelkaj, pluraj....* estas uzataj por individuaj aferoj kaj ankaŭ por ne-distingebla amaso. Tamen *multe, plure, kelke.. da* konvenas nur por ne-distingebla kaj ne tre granda kvanto da aferoj aŭ estaĵoj.

Ekzemple:

- Pluraj el viaj geamikoj vizitos vin la venontan jaron.
  Varios de tus amigos te visitarán el año que viene

La grupo en tiu frazo estas tute distingebla, temas pri parto el via amikaro, ne aliaj.

- Kelke da vortoj sufiĉis por komprenigi al li miajn ordonojn.
(Bastaron algunas palabras para hacerle comprender mis órdenes)

En ĉi tiu frazo la grupo ne estas distingebla (ĉiuj vortoj), krome ĝi ne temas pri granda grupo (nur kelkaj vortoj).

ALIĜU AL
Andaluzia Esperanto-Unuiĝo

Se Vi deziras kunlabori en la disvastigado de la internacia lingvo en Andaluzio, jen Via asocio.

Por aliĝi al AEU kontaktu kun: esperanto14@ono.com
Jara Kotizo: 20 € pagebla ĉe la jena konto:

- Banco BMN (eksa Caja General de Ahorros de Granada)
ES80 0487 3225 1420 0000 6979

Okaze de la pago de la jara kotizo bv. informi pri la jenaj sciigoj:

- Nomo de la aliĝanto.
- Afero: Kotizo 2018


aeu
Andaluzia Esperanto - Unuiĝo
Asociación Andaluza de Esperanto

Turismi en ... TEBA (Malago)

Norde la malaga provinco, inter kamparo plena je oliv-arboj kaj cerealoj troviĝas la vilaĝo Teba. Tie abundas la blankaj domoj tipe andaluziaj kune kun kelkaj palacetoj kaj super la vilaĝo, la restaĵoj de al-andalusa kastelo starigita de la araboj.

Teba troviĝas inter Antekero kaj Arundo, apud la dig-lagoj de la riveroj Guadalhorce kaj Guadalteba. Arkeologiaj restaĵoj pruvas, ke pra-historie homoj loĝis en tiu zono. Tiel, estas eble trovi surrokajn pentraĵojn en la Groto de la *Tajo del Molino.* Teba ankaŭ estis ibera setlejo, la vilaĝeto *Los Castillejos*, tuj apud Teba, estas konsiderata kiel la plej grava ibera loko en la malaga provinco. Belegaj figuroj troviĝas en la Municipa Muzeo de Teba, inter ili la fama kapro de *Los Castillejos.*

Post la dekadenco de la ibera setlejo, la romianoj starigis kelkajn vilaojn en lokoj taŭgaj por la kontrolo de apudaj riĉaj ter-kulturaj teritorioj. La vilaĝo ricevis la nomon *Ategua.* Tiel, apud Teba, estas eble trovi romiajn restaĵojn en *Casilla Vallejo* kaj *El Tesorillo.*



Blazono de TEBA

Post la islama invado de la Ibera Duoninsulo, la araboj konkeris la vilaĝo, kiu ricevis la nomon *Itaba*, jen la origino de la nomo de la urbo.

Ĝi estis la ĉefurbo de la araba regioneto *Takurunna.* La araboj starigis la kastelon *(Hisn Atiba*), konata de la kristanoj kiel la "Kastelo de la Stelo". La nazaria Granada regno-lando pligrandigis la defend-sistemon de la vilaĝo, pere de la konstruo de

novaj defend-turoj apud la urbo, ekzemple la turo de *La Torrecilla,* pro la fakto, ke Teba troviĝis tuj apud la landlimo inter la kristana regno, post la konkero fare de Kastilio de la norda kaj okcidenta parto de Andaluzio, kaj la ankoraŭ rezistanta Granada Regno.



Ibera figuro de kapro.
Ĝi troviĝas en la Municipa Muzeo de Teba

En la jaro 1330 okaze de batalo, la kastilia reĝo Alfonso la 11-a konkeris la kastelon de Teba. Dum la lukto okazis unu el la plej gravaj okazintaĵoj en la Teba historio, tio estas la morto de la skota kavaliro Sir James Douglas, kiu luktis favore la kastilian reĝon cele la konkeron de la vilaĝo, ĝis tiam sub la regado de la granada islama regno.

En la jaro 1522 la imperiestro Carlos la 1-a ordonis la starigon de la graf-lando de Teba, kiu posedis riĉan teritorion apud la rivero Guadalteba. Oni starigis tiam preĝejojn, kiel tiu de la Reĝa Sankta Kruco (18-jarcento), la monaĥejon de Sankta Francisko kaj kelkaj palacetoj. Tamen, kune kun ĉi tiu ter-kultura riĉeco okazis de tempo al tempo, teruraj epidemioj kaj malsataj periodoj.

Dum la 19-a jarcento ter-kulturistaj luktoj okazigis en la teba kamparo nombrajn strikojn, luktojn kaj revoluciojn. Sindikatoj kaj laboristaj organizoj havis nombrajn anojn en la urbo, tiel, jam dum la


dua hispana respubliko (1934), Teba estis la sola andaluzia vilaĝo kie triumfis unuamomente la oktobran revolucion, kelkaj homoj mortis, la lukto finiĝis per la aresto de pli ol 100 homoj.

Post la hispana civila milito kontraŭ-frankismaj luktantoj agadis ĉe la kamparoj ĉirkaŭ Teba. Tio finiĝis dum la 5-a jardeko de la pasinta jarcento. Kiel ĉiuj andaluziaj vilaĝoj, Teba suferis mapliigon de sia enloĝantaro dum la 5-a kaj 6-a jardeko, pro la konstanta elmigrado en industriajn zonojn de la nordo de Hisapnio kaj de Eŭropo.

Monumentoj

- Kastelo de la Stelo

Temas pri la plej granda kastelo en la malaga provinco. Oni starigis ĝin dum la almohada epoko sur 25.000 kvadrataj metroj. Ĝi posedas du muregojn kaj entute 18 turojn.



Nuntempe nur ekzistas ruinoj, escepte de la rekonstruita ĉef-turo kie troviĝas ekspozicio pri la Kruc-milito de la regioneto Guadalteba.

- Preĝejo de la Reĝa Sankta Kruco

Fin-starigita en la jaro 1715, temas pri tipa religia konstruaĵo laŭ la andaluzia baroka stilo. La ĉefa enirejo troviĝas sub belega arko. Ene de la preĝejo tri navoj estas dividitaj de ruĝa kolonaro.





Preĝejo de la Reĝa Sankta Kruco en Teba (Malago)

- Monaĥejo de Sankta Francisko

Starigita dum la 16-a jarcento. Kvankam la monaĥejo unuamomene apartenis al la Dominikana Ordeno, unu el la pastroj tie loĝantaj mortis murdigite en la monaĥejo. Do, la unuaj dominikanoj decidis forlasi la urbon. Poste alvenis komunumo de la Franciskana Ordeno por okupi la monaĥejon, kiu tiam ricevis la nuna nomon. Nuntempe ĝi estas sportejo.

Enirejo de la Monaĥejo
de Sankta Francisko en Teba

Festoj

Douglas Day, jes angla-lingve, estas la plej konata kaj grava festo okazanta en Teba. La tradicio rakontas, ke la skota reĝo Roberto la 1-a mortis pro lepra malsano. Li neniam povis plenumi sian revon lukti en la kruc-militoj. Pro tio li, kiel lasta deziro, ordonis al la skota kavaliero Sir James Douglas preni sian koron kaj porti ĝin en Jerusalemon.

La skota kavaliro, en sia vojo al Palestino por plenumi la peton de sia reĝo, alvenis en Sevilon, tie li renkontiĝis kun la kastilia reĝo Alfonso la 11-a, kiu tiu-tempe preparis batalon kontraŭ la islama reĝo de Granado en Teba. La kastilia reĝo konvikis al la skota kavaliro por partopreni en la lukto. Sir James Douglas mortis dum la atako al la kastelo de Teba. Laŭdire, la skota kavaliro, ĉirkaŭigita de islamaj malamikoj, decidis forĵeti al ili la koron de la skota reĝo, tiel oni plenumus la deziron de la reĝo lukti en kruc-milito. Laŭ la legendo, antaŭ la forpaso, li ekkriis: "Antaŭen, kuraĝa koro *(Brave Heart)*, tie kien vi iras, vi venkos, kaj Douglas sekvos vin aŭ li mortos survoje!"



Parado de skotaj sak-flutistoj en Teba okaze de la festo de la *Douglas Day*.

Nuntempe, en la vilaĝo Teba, oni memoras ĉiu-jare, fine de la monato aŭgusto, ĉi tiun lastan batalon de la skota kavaliro. Temas pri la *Douglas Day*. Dum la festo okazas mez-epokaj teatraĵoj, tiu-tempaj bazaroj kaj aliaj aktoj tipe skotaj, kiel parado de sak-flutistoj, viski-festo, ktp.

Alia grava festo en Teba estas la organizado de ekspozicio de fromaĝoj, kies ĉeestantoj estas la plej gravaj produktistoj de fromaĝoj en Andaluzio kaj Hispanio.

Gastronomio

En Teba oni preparas specialan pan-supon, kiu estis la ĉefa manĝaĵo de la ter-kulturistoj kaj paŝtistoj. Ĝi nomiĝas *lavapuertas*. Verdaj asparagoj ankaŭ estas la kerno de bongusta kuiraĵo al kiu oni aldonas tomatojn kaj italajn verdajn paprikojn.

Venont-numere TURISMI EN ....

FUENTE PALMERA (Kordovo)

Ĉu Vi deziras kunlabori kun la revuo?

Ne hezitu sendi Viajn kunlaboraĵojn: artikolojn, desegnaĵojn, informojn, ludojn....

Gazeto Andaluzia estas la plej veterana esperanto-publikigaĵo en Andaluzio, tamen ĝi fariĝas tagon post tago kaj Via kunlaborado estas nepra.

Kontaktu kun: esperanto14@ono.com

F L A M E N K O

Tangoj



Juan Martínez Vílchez
Pericón de Cádiz

Plena Ilustrita Vortaro difinas la vorton *"tango"*, kiel tiu sud-amerika kanto, el kiu evoluis danco kun malrapida kaj volupta ritmo. Ĉi tiu difino memorigas al leganto la tipan argentinan aŭ urugvajan dancon, tre konata en la tuta mondo. Tamen, el la flamenka vidpunkto, tango estas baza kantaĵo kies origino troviĝas en Kadizo kaj el tie ĝi eliris ĝis Sud-Ameriko, kies dancado famiĝis en la tuta mondo kaj nun ĝi estas la plej populara kantado de urboj kiel Bonaero.

La origino de la flamenka tango reale troviĝas en Kubo. El la karibea ĉef-insulo venis du gravaj kantaĵoj, la *habanera*, kun melankolia aŭ ama temaro, kaj la tango, kiu pritraktas pli amuzajn kaj eĉ humurajn aferojn. Ĝis la fino de la 19-a jarcento la tango ne eniris en la flamenkan arton. Ĝis tiam ĝi estis nur konsiderata kiel amuza kantaĵo.

Tamen, komence de la 20-a jarcento aperas la unuaj tangoj *flamenkigitaj*, konataj ankaŭ kiel *tientos*. La miksiĝo inter la flamenkaj melodioj kaj la karibeaj ritmoj plen-ĝojigis ĉiujn flamenkajn spektaklojn en tiu epoko, tiu fandiĝo okazis kiam la flamenkaj kantistoj en la urbo Kadizo, kun lanta ritmo, kantis tiujn karibeajn ritmojn. Tiel, la aŭskultantaro ne nur deziris aŭdi pri perditaj amoj aŭ pri socia mizero, jen la plej ofta temaro en la tiutempaj flamenkaj kantadoj, sed ankaŭ li deziris rideti pri amuzaĵoj, kaj tiu estis la ĉefa temo de la tangoj, kvankam ankaŭ pri amo kaj sociaj rilatoj oni kantas per la tangoj.

Kiel dirite, la kerno de la flamenkaj tangoj estis la urbo Kadizo. Enrique el Mellizo, Aurelio Selles, Antonio el Chaqueta aŭ la granda Pericón de Cádiz estis la plej konataj tango-kantistoj.

Rilate la strofojn, la tango estas reale mallongaj *soleás* kaj pri la formo de la strofoj ili estas tute liberaj. Jen kelkaj strofoj de tangoj kantitaj de José Menese:

Sinjoro, kiu ĉevalon rajdas
kaj li ne diras bon-matenon,
li ne diras bon-matenon,
tamen se la ĉevalo larmas
tiam li petos onian helpon.

Vi ĉiam same agadas.
Ŝajnas al mi, ke en via kap'
la birdoj jam flugadas.
Kortojn vi ne deziris,
vi ne ŝatis kortojn,
ĉar tiu knabin' flug-iris
pli alte ol aglo reĝa.

Asociación Andaluza de Esperanto
Andaluzia Esperanto-Unuiĝo

Al servicio de la difusión del Esperanto en Andalucía y de la cultura andaluza en el mundo, a través de la lengua internacional.

Su colaboración es importante, no dude en hacerse socio o renovar su afiliación para el año 2018. Más información sobre procedimiento de afiliación en la página 21.

Misteroj kaj Legendoj de Andaluzio

La tombejo San Miguel en Malago



La tombejo San Miguel estas la plej antikva en la urbo Malago kaj el la arkitektura vidpunkto, unu el la plej belaj en Hispanio. La senhalta pliigo de la ĉefurbo de la Suna Marbordo igis, ke la tombejo hodiaŭ troviĝas preskaŭ meze de la urbo.

Laŭdire, neniu pli trankvila kaj kvieta loko ol tombejo, tamen tio ne okazas en la tombejo San Miguel en Malago.


Dum la lasta jaroj, ne-kompreneblaj aferoj okazis tie, kaj ne nur unu, sed pliaj. Hodiaŭ, ni parolos pri la tombo de la infano *Antoñito*. En la jaro 1985 la pastro kiu respondeciĝis pri la preĝejeto de la tombejo estis José Fernández, pli konata kiel la "Frato Pepe". Pro mason-laborajĵoj okazantaj en sia propra domo, li devis pasi kelkajn tagojn kaj noktojn en ĉambro situanta ene de la propra preĝejeto en la tombejo. Dum nokto, en la monato novembro, je la 2-a horo matene li decidis preĝi ekstere de la ĉambro.

Nenian bruon oni povis aŭskulti je tiu horo, ĝis kiam li aŭskultis perfekte la sen-konsolan plendon de infano kiu ekkriis: *Panjo, Panjo !* Laŭ li mem deklaris, ne temis pri besto aŭ pri alia komfuza sono. La pastro asertis, ke li aŭskultis klar-detale infanan veon. Li decidis sekvi la ŝpuron de la sono, ĝi eliris el tombo.


Dum la sekvanta mateno, li decidis konsulti la registro-libron de la tombejo. Li tiam eltrovis, ke en tiu tombo oni entombigis du jaraĝan infanon kun la nomo *Antonio*, li mortis pro leŭkemio post teruraj doloroj. Post tiu unua nokto, kaj laŭ deklaro de la respondeculo de la tomb-preĝejeto, novaj vizioj de infano okazis en la tombejo, kvankam nur dum apenaŭ kelkaj sekundoj kaj sen pliaj konsekvencoj.


Ĉi tiu stranga afero disvastiĝis tra la tuta urbo kaj ekde tiam multaj homoj iras en la tombejon por lasi lakton kaj karamelojn apud la tombo. Laŭdire, la karameloj kaj la lakto malaperas post kelke da tempon, tamen ne ezkistas ia pruvo pri ĉi tiu aserto, kiu sendube suldiĝas al la popola fantazio. Male, la Frato Pepe decidis kolekti ĉiujn dolĉaĵojn kaj ludilojn tie lasitaj, kun la celo doni ilin al asocioj prizorgantajn sen-rimedajn infanojn.

Kompreneble la popola opinio amplifis kaj pligrandigis la gravecon de la okazintaĵoj kaj tiel, oni jam parolas pri “eta anĝelo” kaj pri “eta popola sanktulo”



Vorta Piramido






1
2
3
4
5
6
7
8

Ĉi-foje estis Nefertiti tiu kiu sendis al ni jenan vort-ludon. Komencu per la plej alta kvadrato, tiu signita per la cifero 1. Por solvi la kvadraton 2-an uzu la literon de la kvadrato 1-a plus alia litero. Tiu de la kvadrato 3-a egalas al la literoj de la 2-a plus alia, kaj tiel plu. Ne timu, ĝi estas ege facila !

1. Finaĵo de la adjektivoj.
2. Prepozicio uzata por rilatigi ion kun liaj komplementoj.
3. Adjektive, lirika poemo, dividita en strofoj.
4. Relative maldika plato el metalo.
5. Komike stranta.
6. Monunuo.
7. Fera paliso uzata por aligi ŝipon.
8. Ano de norda regiono de eŭropa ŝtato

REBUSO



Rompitaj de Spartako: _____

Solvo al la pasintnumera Vorta Piramido.

I
NI
ONI
FINO
MORFIN
INFORMO
FORMINGO

Ĉu la revuo plaĉas al Vi? Ĉu Vi ŝangûs ion?
Ĉu io aldonebla? Ĉu forviŝi ion?
Komentu kaj proponu per jena kontaktilo:



esperanto14@ono.com

HUMURO



La numero 107-a de nia revuo aperos dum la monato oktobro 2018. Ni dankas Vian kunlaboradon, ĉar la eldonado de revuo nur estas ebla se ni ĉiuj kunlaboras. DANKON !

esperanto14@ono.com

GAZETO ANDALUZIA
Apartado de Correos 3142
14080 CÓRDOBA (Andaluzio – Hispanio)

Andaluzia Esperanto-Unuiĝo
Asociación Andaluza de Esperanto

★

Andaluzia Esperanto-Unuiĝo estas la asocio kiu strebas al la disvastigo de la internacia lingvo Esperanto en Andaluzio.
Ĝi fondiĝis en la jaro 1984a danke al la iniciato de geesperantistoj de la provincoj Malago, Sevilo kaj Kordovo. Hodiaŭ apartenas kaj kunlaboras kun A.E.U. geesperantistoj de la tuta Andaluzio kaj eĉ ekster ĝi.

Estraro

Prezidanto : Angel Arquillos López
Vicprezidantino: Fátima Jiménez García
Sekretario: José María Rodríguez Hernández
Kasistino: María Dolores Torres Mateo
Voĉdonantoj: Jordi Lietor López
Antonio Rodríguez Gasch

Adreso: C/ Ánfora 6 5-D 29013 Málaga

E-Adresoj: angelarquillos@gmail.com
esperanto14@ono.com

TTT-pago: www.esperanto.ac
www.esperanto-andalucia.info
Blogo: www.andaluciaesperanto.blogspot.com

Aliaj utilaj adresoj de la Esperanto-Movado

* Universala Esperanto-Asocio
Nieuwe Binnenweg 176 NL-3015 BJ Rotterdam (Nederlando)
uea@inter.nl.net

* Hispana Esperanto-Federacio
C/ Rodríguez San Pedro 13-3-7 28015 MADRID (Hispanio)
admin@esperanto-es.net

UNED

CUID
Centro
Universitario de
Idiomas Digital
y a Distancia

¡ Última Hora !

La Universidad Nacional de Educación a Distancia convoca un curso de la lengua ESPERANTO, nivel A2.

No dejes pasar esta oportunidad para aprender la lengua internacional en un centro de prestigio, oficial y acreditado.

Más información en la página 7.

Plazo de matrícula: hasta el 8 de noviembre.